

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)
98-a jaro • n-ro 1187 (12) • **Decembro 2005**

Seminario en centra Afriko



Kia nova lingva ordo? Seminario en Afriko Esperanto en Radio IJK en Sarajevo Kongresa Komunikado 1

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio
(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:
Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎, ✉ +421 43 4222 788
✉ revuo@stonline.sk; revuo@esperanto.sk

Aperas:
en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktotino:
la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 115 landoj.

Voclegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 35); informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO. Unuopa ekzemplero kostas EUR 3,20.

Anoncarifto (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550, 1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90. Movada rabato 50%. Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe Postbank, Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam (IBAN: NL24PSTB0000378964 SWIFT: PSTB NL21)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank, Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam (IBAN: NL66ABNA0426051599 SWIFT: ABNA NL2R).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176,
NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando

☎+31-10-436-1044, ✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@inter.nl.net

TTT: <http://www.uea.org>

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 243 **Malferme:** Unesko: kia nova lingva ordo? (Renée Triolle).
244 Seminario en centra Afriko (Tereza Kapista).
245 Esperanto en radio. Internaciaj radioelsendoj en Esperanto.
247 Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo (Samir Ribić).
248 Kongresa Komuniko 1.
249 **Leterkesto:** Esperanto ne estas mirakla ĉiosolvilo (István Ertl). Kompletigita Plena Verkaro (Gerrit Berveling). La (mal)benitaj krucenigmoj (J. Ducrocq). La koboldo laboris diligente (Garik Kokolija). La nove-malnova PIV (Mike Jones). Pri la enhavo de la revuo (Jiří Patera).
250 Navige tra TTT-paĝoj.
251 **Reagoj:** Nova fazo (Zlatko Tišljar).
252 **Reagoj:** Kulpigi la politikistojn ne sufiĉas (I.F. Bociort).
253 **Recenzoj:** José Antonio Vergara pri *Vortaro Volapük-Esperanto kaj Esperanto-Volapük*. Franjo Provost pri *Kristnaska kordo*. István Ertl pri *La Taglibro de Csoma Sándor*.
254 Efthimios Mavrogeorgiadis pri *Reĝino Jokasta*. La angulo de EVA: John Francis: *El «La fino»*.
255 **Laste Aperis.**
256 **Loke-Fake-Persone:** Katalunio. Uzbekio/Japanio. Pollando. Kolombio. Brazilo. Japanio.
257 **Oficiala Informilo.** Rotario 100-jara! Nederlando. **Reago:** Miskomprenita filozofio de Goethe (Ulrich Becker).
258 **Tra la mondo:** Pekino por niaj estontaj artistoj (Niu Xueqin). Rekomendo al la registaro (Gang Gong-Rjol).
259 **Esperanto-Tago** en Odeso (Semjon Vajnblat). Infanoj amuzis sin arbare (Stefan MacGill).
260 **Indekso 2005.**

KOVRILPAĜE: Tereza Kapista, la fama Cseh-metoda instruistino el Beogrado, gvidis ĉi-somere Esperanto-kursojn en la afrika lando Burundo (legu pli sur la p. 244). Sur la foto: Grupo da komencantoj atendis Tereza kiam ŝi eliris el buso en Rumonge kaj kantis speciale por ŝi verkitan kanton: *Kia ĝoja tago, venis al ni blankulino kaj instruos al ni lingvon de la paco!* – Ŝiaj larmoj ekfluis: Belaj kaj saĝaj infanoj!

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (ĝenerala planado, eksteraj rilatoj, informado): D-ro Renato Corsetti, Via del Castello 1, IT-00036 Palestrina, Italio; ☎+39 06 957 57 13; ✉ +39 06 957 66 33; ✉ renato.corsetti@esperanto.org.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont, 2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim, Luksemburgio; ☎+352 23 66 88 64; ✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala sekretario: S-ino Ulla Luin, Myggdalsvägen 123, SE-135 42 Tyresö, Svedio; ☎+46 (0)8 712 82 91; ✉ ulla.luin@esperanto.org.

Financo, administrado, TEJO: S-ino Ans Bakker-ten Hagen, Kastelenstr. 231-II, NL-1082 EG Amsterdam, Nederlando; ☎/✉ +31 (0)20 642 18 53; ✉ ans.bakker@esperanto.org.

Azia Agado, Amikoj de Esperanto: S-ro Yu

Tao, P.O. Kesto 825, CN-100037 Beijing, Ĉinio; ☎/✉ +86 (0)10 68995946; ✉ yu-tao@china.com.

Faka kaj scienca agado: Prof. Amri Wandel, N-ro 767, IL-71908 Makabim, Israelo; ☎+972 (0)8 926 44 62 (h); +972 (0)2 658 68 60 (of); ✉ +972 (0)2 658 44 61; ✉ amri@huji.ac.il.

Landa kaj Regiona Agado: S-ino Maritza Gutiérrez González, Avellaneda 212, e/ Gertrudis y Josefina, CU-10500 Habana, Kubo; ☎+53 (7) 539201 (h); +53 (7) 404484 (of); +53 (7) 338729; ✉ mgglez@enet.cu.

Observanto de TEJO: S-ro Chuck Smith.

Observanto de ILEI: S-ro Radojica Petrović.

Speciala komisiito pri informado: D-ro Jukka Pietiläinen, Soidintie 8 E 28, FI-00700 Helsinki, Finnlando; ☎+358 (9) 8036149 (h); ✉ +358 (3) 215 6248 (of); ✉ jukka.p@esperanto.fi.

Malferme

Unesko: kia nova lingva ordo?

Unesko kunigas preskaŭ 200 ŝtatojn, do multnombros la lingvoj de la delegitoj. En 1984 estis decidite uzi por dokumentado kaj interpretado dum kunvenoj de la membroŝtatoj la anglan, araban, ĉinan, francan, hispanan kaj rusan. Tio funkciis dum la 33-a Ĝenerala Konferenco en Parizo (03-21 okt 2005), eĉ se nur la ĉinoj vere parolis ĉine.

Sed tiu bela situacio, kostega tempe, mone kaj homforte, pli kaj pli devojiĝas. Ekzemple dum la Malfermo aŭdiĝis nur la angla, eĉ se la Ĝenerala Direktoro, japano, uzas laŭvice la anglan kaj la francan. Panamo, nome de la hispan-parolantoj, proponis rezolucion por certigi laŭ antaŭa rekomendo egalecon en la diskutoj kaj en formulado de la rezultoj, do nepran ekvilibran uzon de la laborlingvoj dum internaciaj konferencoj kaj interŝtataj kunvenoj.

Ĉu lingvo-egaleco?

Tiu tagordero pri uzo de la lingvoj ĉe Unesko aperis lastmomente, do multaj delegitoj, kiujn mi intervjuis, ne havis ideon aŭ rekomendon. Tre klaras, ke ĉiuj volis konservi la nunajn lingvojn (ĉefe la rus- kaj hispan-parolantoj). Iuj proponis aldoni la svahilan, la portugalan aŭ la turkan – jam internaciajn. Mi notis, ke delegito de Tanzanio intervenis en la svahila (li provis la interpretistojn per angla traduko), tiu el Makedonio en la makedona (franca traduko), el Irano en la persa (traduko en la angla), la ministro pri edukado el Brazilo en la portugala (traduko en la hispana), delegito el Nov-Zelando komencis en la maoria.

La delegitoj, kiuj ne bonŝancas paroli denaske unu el la laborlingvoj, intervenas en unu el ili: tamen mi ĉiam miras, kiam delegito el Ĉeĥio, Serbio, Hungario, Latvio aŭ San Marino intervenas en la angla. Eblas facile konkludi pri ia lingvopolitiko, kiu anstataŭigas unu imperialismon per alia, eĉ se la angla ne estas sentata tia.

Ĉiuj delegitoj sentas la nunan tendencon redukti la nombron de la lingvoj pro troa kosto, dum Unesko klare

ripetas, ke necesas protekti la diversecon de kulturaj enhavoj kaj artaj esprimiloj..., promocii la uzon de plurlingveco sur la reto..., noti la gravecon de la kultura diverseco kaj plurlingveco... (art.12 de rezolucio pri bioetiko).

Ĉu la angla pli egala?

La vortoj do ne kongruas kun la faktoj: protestis la oficistoj de Unesko per tuta paĝo en la angla, duonpaĝo en la franca kaj hispana (nenio en la araba, ĉina, rusa). Iĝis normale, ke ĉiu komprenu la anglan: ekzemple dum festa vespero kun la prezidento de Taĝikio, aŭ dum kolokvo pri la nacia parko de Altaĵo, se vi ne komprenis la taĝikan aŭ la rusan, vi devintus kompreni la anglan. Pli kaj pli da dokumentoj aperas nur en la angla (ofte en la franca pro geografia diplomateco); eventuale, tradukoj aperas post 2 jaroj.

Se la tuta mondo mobiliziĝus ekde la unua mateno kontraŭ Usono, por kiu kulturo aŭ kulturaĵoj estas simpla varo, kaj amase voĉdonus kontraŭ (1 por, 4 sindetenoj), la uzo de la angla ne estus sentata kiel imperiisma aŭ kulturaba. Do restas al ni esperantistoj granda laboro argumenti, informi, klarigi kaj konvinki la landajn komisionojn de Unesko, subteni niajn strebojn por pli justa internacia lingvo-ordo.

La propono de Aŭstrio fari el 2007 internacian jaron de la lingvoj ne estis pritraktita, ĉar la 21-a de februaro estas jam Internacia Tago de la Patrino Lingvo.

La NRO-j kunvenos de la 14-a ĝis la 16-a de decembro 2005 en Parizo por sia ĝenerala kunveno, dediĉita al la daŭra edukado por ĉiuj.

Renée Triolle
reprezentanto de UEA ĉe Unesko



La oficiala fermo de la Ĝenerala Konferenco de Unesko. El ĉiuj ĉeestantaj landoj, malgraŭ vigla kontraŭstaro de Usono, pli ol 96% aprobis la Konvencion pri kultura diverseco. Nun minimume 30 ŝtatoj devos ratifi la konvencion por ke ĝi ekvalidu. Fotoj: François Lo Jacomo

Renée Triolle prezentas en la halo de Unesko, kion faros UEA koncerne la Unesko-programon Edukado por ĉiuj. Duan similan filmon faris François Lo Jacomo nome de ILEI.

Seminario en centra Afriko

La ĉi-jaran aŭguston kaj la unuajn dek tagojn de septembro la konata beograda Cseh-instruistino Tereza Kapista pasigis en Burundo, kie ŝi gvidis internacian Esperanto-seminaron.

La seminario estis parto de la agado "Lingvo de paco", kadre de la Agado Espero de UEA. Finance subtenis ĝin Fondaĵo Espero de UEA kaj Fondaĵo Hans, memoriganta pri Hans ten Hagen, unu el la plej aktivaj nederlandaj esperantistoj.

La loka Esperanto-grupo per ricevitaĵ libervolaj donacoj aĉetis du kaprinojn kaj planas aĉeti du pliajn. Ankaŭ Tereza Kapista aĉetis kaprinon por la klubo. La prizorgado de la kaprinoj celas provizi la klubanojn per mono – por aĉeti librojn, skribilojn, revuojn, kaj ankaŭ por helpi pagi materialojn aĉetendajn por viziti normalajn lernejojn. Tereza verkis por nia revuo vojaĝ-raporton, kun riĉa fotomaterialo. Jen la unua parto.

Tereza donas al infanoj medikamenton kontraŭ haŭta malsano

Fortaj travivaĵoj en Burundo

Al Burundo mi forvojaĝis la 29-an de julio. La vojaĝo estis longa kaj kun malbonaj kunligoj. Feliĉe mi bonorde atingis la celitan lokon, la ĉefurbon Bujumburo. Tie jam atendis kaj bonvenigis min kelkaj esperantistoj. Ni tuj vojaĝis al grandega lernejo, kie okazos la internacia seminario. Mi transdonis la alportitajn librojn – *La Nova PIV*, *Antologio de serba poezio*, lernolibrojn de la Zagreba metodo, *Esperanto-Kirundi* kaj aliajn lernolibrojn, kajerojn, kraĵojn ktp.

Tuj la duan tagon komenciĝis la instruado. Mi kun tremanta koro aliris la lernejon, nesciante, kio atendos min tie, sed feliĉiga evento: la lernoĉambro estis plena! Venis 12 konganoj kaj 4 tanzanianoj el Rumonge, Burundo, la resto estis el Bujumburo. Entute mi havis ĉ. 80 seminarianojn. Mi estis tre kontenta, ĉar plejparte temis pri gejunuloj kaj studentoj. Tio ege gravas al nia movado, por havi posteulojn kiuj povos plu porti la torĉon.

La nivelo de ilia scio estis tre diversa, do mi iomete flankenmetis la komencantojn (tiujn instruos la instrukapablaj, post mia reiro), kaj mi plejparte laboris kun la ceteraj. Mi ne nur instruis, sed ankaŭ prelegis pri UEA, TEJO, Zamenhof, diversaj E-asocioj kaj organizaĵoj, fakgrupoj ktp. Ni diskutis pri diversaj organizaĵoj kaj financaj solvoj de ilia problemoj. Ili ĉiuj atendas monon el Eŭropo. Mi klarigis ke ĉiu klubo devas mem ellabori iun programon, pere de kiu ĝi povos perlabori monon, por povi propramone kopii librojn aŭ aĉeti lernomaterialojn. La sendado ja multekostas kaj eĉ se iu decidas donaci, oni devas trovi pluajn rimedojn por financi la sendokostojn.

Jam post la unua tago mi vidis kiel dividi la grupojn. Ekzistas aparta grupo ĉe la fakultato, ĝi estas homogena grupo, ĉiuj estas studentoj kaj tie do ne estis problemoj. Ili jam multon lernis, sed tamen ne sufiĉe por esti kapablaj mem instrui.

La grupo el Kongo montris bonajn sciojn. El ili ses estas jam instrukapablaj kaj el Tanzanio eĉ ĉiuj kvar.

Inter la kandidatoj aperis ankaŭ 14-jara knabo Gilbert Niyukuri. Unue mi ne kredis ke li kapablos instrui, sed jam post la dua studhorro mi vidis ke li bonege regas la lingvon kaj tre profesie klarigas gramatikajn. La kandidatoj devis rakonti pri iu temo kaj skribi frazojn sur tabulon – kaj Gilbert tuj reagis kiam li vidis erarojn. Mi lasis lin ke li korektu la erarojn, ĉar tiamaniere mi povis pritaksi liajn sciojn. Cetero li havas du fratojn, kun kiuj li hejme parolas Esperanton. Mi ŝercante diris al li ke eble ni ne povos doni al li diplomon pri instrukapableco, ĉar li estas tro juna. Li triste reagis, dirante: *Sed mi jam promesis al miaj kamaradoj en la klaso ke mi instruos al ili Esperanton en la venonta lernoĵaro*. Kiam dum la ekzameno li devis instrui la nombradon de 1 ĝis 10, ĉe la fino li kantigis la seminarianojn

Ni kantas kun komencantoj

Seminarianoj en Rumonge

Esperanto en radio

Internaciaj radioelsendoj en Esperanto

(horoj laŭ UTC)

Ĉiutagaj elsendoj

Pola Radio	09:30-09:59	Sat1, Sat5	Eŭropo
Pola Radio	11:00-11:29	Sat1, Sat5	Eŭropo
Ĉina R. Int.	11:00-12:00	9510, 7150	Japanio, Koreio
Ĉina R. Int.	13:00-14:00	9440, 11650	Sudorienta Azio
Pola Radio	16:00-16:25	7270, 7285	Eŭropo
Ĉina R. Int.	16:00-17:00	1215	Sudorienta Eŭropo
Pola Radio	19:00-19:25	7285	Eŭropo
Pola Radio	20:00-20:29	Sat1, Sat5	Eŭropo
Ĉina R. Int.	19:30-20:30	7265, 9745	Eŭropo
Ĉina R. Int.	22:00-23:00	9860, 11700	Latin-Ameriko

Dimanĉaj elsendoj

R. Havano Kubo	07:00-07:30	9820	N. Ameriko, Pacif. Azio
R. Havano Kubo	15:00-15:30	11680	Ameriko, Karibio
Radio Vatikana	19:20-19:30	585, 1530, 4005, 5890, Sat3	Eŭropo
R. Havano Kubo	19:30 20:00	13750 kHz	Eŭropo
Itala Radio	20:00-20:20	6110, 9745, Sat2	Eŭropo
Radio Vatikana	21:50-22:00	585, 1530, 1611, 4005, 5890, Sat3	Eŭropo (ripeto 21:20)
R. Havano Kubo	22:00-22:30	13750	Eŭropo
R. Havano Kubo	23:30-24:00	9505, 9600, 11875	Ameriko, Karibio

Dum aliaj tagoj

Radio Vatikana	19:20-19:30	1611, 7250, Sat4	Eŭropo (merkredo)
Radio Vatikana	19:20-19:30	1611, 7250, 9645, Sat4	Eŭropo (ĵaŭde)

Arkivoj aŭskulteblaj per interreto

Stacio	Ligo	Priskribo
Ĉina R. Int.	http://es.chinabroadcast.cn/ Dekstre sube troviĝas blua kvadrato "Radio online" kun ligo al RealAudio, arkivoj de la 7 lastaj programoj.	Ĉiutage 1-hora programo.
Pola Radio	http://www.radio.com.pl/polonia/audio.asp?rld=1 Elektu inter la lastaj 7 programoj.	Ĉiutage duonhora programo.
R. Vatikana	http://www.oecumene.radiovaticana.org/en1/on_demand2_esp.asp Elektu la servmaŝinon plej proksiman al vi (Afriko, Ameriko, Eŭropo, Vatikano).	La lasta programo, 10-minuta, renovigata dimanĉe, merkredo, ĵaŭde.
Itala Radio	http://www.international.rai.it/radio/multilingue/ram/esperanto.ram	Ĉiusemajne unu programo (ŝanĝata sabate vespere).

Satelitaj indikoj

Nomo kaj pozicio de satelito, frekvencoj kaj polarizado.


Sat1: Paralele al la mallongaj kaj mezlongaj ondoj iuj elsendoj estas emisiataj per satelito *Eutelsat II F - 6 - Hot Bird*, 13 gradoj de la orienta latitudo; frekvenco 11,474 GHz, polarizo horizontala (H); subportanto 7,38 MHz. Sur la tereno de Eŭropo estas rekomendata parabolo kun la diametro de 80 cm. En aliaj mondpartoj (Norda Afriko, Centra Oriento, iuj regionoj de Kazahstano) rekomendinda estas parabolo kun la diametro de 1,8 m.

Sat2: Satelito *Hot Bird 1*, laŭ analogia metodo, de la internacia radia kanalo sur la aŭda subportanto de *Raidue* (dua kanalo de RAI); polarizo okcidenta vertikala, 11,446 GHz.

Sat3: *INTELSAT 325*, 5 East – 4097,75 MHz – LHCP-polarizo.

Sat4: *INTELSAT 602*, 62 East – 4097,100 Mhz – LHCP-polarizo.

Sat5: Satelito *Hot Bird 1*, 12360 MHz, horizontala polarizo, PID-kodo 773 laŭ cifereca modo.



Kiel kapti la radioelsendojn?

Internaciaj stacioj dissendas precipe per mallongaj kaj mezlongaj ondoj, kelkaj ankaŭ per satelito kaj interrete per *RealAudio*.

Adresoj de la radio-stacioj

Skribi al internaciaj radiostacioj estas grava helpo por ili. Esperantistoj pruvu, ke ili ekzistas kaj aŭskultas. Simpla poŝtkarto aŭ retmesaĝo al Esperanto-redakcio, por informi ke vi aŭskultis, por esprimi vian opinion, ion sugesti, ktp estas tre utila por la redakcioj.

Ĉina Radio Internacia: ☒ China Radio International, Esperanto-Sekcio, Shijingshan Road 16A, CN-100866 Beijing, China. ☎(10) 6851-3174/3175; ☐ <http://es.chinabroadcast.cn/>; esperanto@cri.com.cn.

Itala Radio: ☒ Esperanto-fako, RAI International, C.P. 320, Centro Corr., IT-00187 Roma, Italio. ☎ 06 331 71 895; ☐ www.international.rai.it/radio/index.shtml; ondacorta@rai.it; trad.esperanto@rai.it.

Radio Havano Kubo: ☒ Esperanto-Sekcio, Radio Havana Cuba, Apartado 6240, La Habana, Cuba. ☎(7) 338729; ☐ www.radiohc.cu/radiohc@enet.cu.

Radio Polonia: ☒ Esperanto-Redakcio, Skrytka 46, PL - 00-977 Warszawa, Pollando. ☎ + 48 (22) 6459 337; + 48 (22) 6459 358; ☎ + 48 (22) 645 59 17; ☐ <http://www.radio.com.pl/polonia/eol>; esperanto.redakcio@radio.com.pl.

Radio Vatikana: ☒ Radio Vatikana, Esperanto-redakcio, VA-00120 Città del Vaticano, Vatikano. ☎ 06 6988 4565; ☐ www.vaticanradio.org/esperanto/proesperanto.htm; esperanto@vaticanradio.va.

Aliaj utilaj interretaj ligoj:

www.radioarkivo.org/; <http://eo.wikipedia.org/wiki/Esperanto-radio>; <http://esperanto-radio.net/>; www.radio-esperanto.com/; www.osiek.org/aera; www.tejo.org/uea/Frekvencoj_Kaj_Aliaj_Konsiloj; http://eo.wikipedia.org/wiki/Historio_de_Esperanto_en_Radio; www.groups.yahoo.com/group/per-esperanto-radio/ (diskutgrupo pri la temo). Ĉe la suba FTP-adreso eblas elŭti la hodiaŭan elsendon de Pola Radio: ftp://66.28.252.97/today/polonia_esperanto_2000.rm. ☆



La instrukapablaj seminarianoj en Rumonge



La fakultata grupo en Buĵumburo



Klaso kun aĉaj benkoj, sed bonegaj studentoj



Ĵurnalistoj surbendigas intervjuon pri la seminario



Alvenis la aĉetita kaprino.
Foto: Tereza Kapista

per – kanto pri la numeraloj! La skriban ekzamenon li faris kun nur du eraroj. Tiu sprita kaj diligenta knabo (vidu sur la suba foto) do farigis la plej juna instruisto kaj krom la diplomo li ricevis ankaŭ donacon – vekhorloĝon en la formo de verda dometo, ĉar li ja devos esti tiu kiu agos por la projekto konstrui Esperanto-klubon en Rumonge.

La fina statistiko estis jena: 31 instrukapablaj instruantoj, 38 progresantoj kaj 94 komencantoj, do entute 163 homoj venadis al la seminario en ambaŭ urboj Buĵumburo kaj Rumonge.

La komencantoj estis junaj kaj ili daŭrigos la lernadon en diversaj lokoj, de kie venis ankaŭ la instrukapablaj, kiuj ja plejparte estas instruistoj en la lernejoj. Do, ili estas valoraj por la estontaj jaroj!

Mi instruis ankaŭ sabate, nur dimanĉo estis dediĉita al ekskurso. Bedaŭrinde ne ĉiuj povis iri ĝis la lago Tanganjika, ĉar oni devis pagi vojaĝbiletojn. Al la apudlaga urbo ne kondukas buslinio kaj oni devas uzi ankaŭ taksojn.

Kvankam estis varmege, mi bone eltenis la klimaton, ofte trinkante akvon. La seminarianoj miris pro tio kaj konstatis, ke ili tre malmulte trinkas! La manĝado dum la seminario estis organizita tiamaniere, ke venis kuirstinoj, metis grandegan poton sur tri ŝtonojn, faris fajron kaj – kuiris. La menuo estis preskaŭ ĉiam la sama: ĉiutage fazeoloj kaj kaĉo el manioka faruno. Foj-foje rizo, sed tio jam estis lukso. Panon oni ne manĝas. Poste mi konstatis ke en ĉiu parto de la lando estas tiaj nutradkutimoj. Oni manĝas monotone, ne havas fornojn, en malgrandaj urboj oni kuiras ekster la domo kaj ne eblas sur unu fajro fari diversajn manĝaĵojn.

La loĝejo por seminarianoj ne estis komforta, ili kuŝis po du sur unu matraco, metita sur la planko. Kelkaj plendis pri tio, sed venkis la amo al Esperanto kaj ĉiuj sukcese finis la seminaron. Dum la tuta tempo mi sentis ke ili estas ege dankemaj pro mia vizito, unuafoje vidinte vivan, Esperante parolantan eŭropaninon.

Dum la seminario mi estis akceptita ĉe la Ministerio de kulturo, kaj ankaŭ ĉe la direktoro de la loka radiostacio. Tiu sendis ĵurnaliston, kiu faris 90-minutan programon, poste elsenditan en kelkaj partoj.

Buĵumburo estas haosa urbo, se mi tiel povas diri. La tutan trafikon faras privatuloj – per busetoj, kiuj prenas pli da homoj ol oni rajtas, kaj ne startis ĝis ĉiu loko estas okupita. Tio ĝenis min, sed mi ne povis ĉiutage pagi takson. Komence mi faris tion, sed poste pro aliaj kostoj mi devis redukti kelkajn elspezojn. La urbo estas malpura, ne estas organizata forpreno de rubaĵoj, kaj malpura akvo fluas apud la stratoj, kiuj ofte ne estas pavumitaj. Ĉie estas multe da polvo. Ekzistas kelkaj belaj vendejoj kaj la hotelo Novotel, kiun vizitas nur la UN-soldatoj, gardantaj la pacon en tiu ankoraŭ ne tute trankvila regiono. Feliĉe dum mia restado ĉio estis en ordo. Bone ke mi antaŭ la vojaĝo prenis vakcinojn. Mi povis esti trankvila, kvankam kontraŭ malario vakcinado ne ekzistas, tamen oni povas surloke preni medikamentojn, kiuj estas sufiĉe efikaj.

Alian fojon mi skribos pri Rumonge kaj pri la esperantistoj, kiuj helpis al mi realigi la vojaĝon kaj fini ĝin kun sukceso.

Tereza Kapista



Tereza kun la plej juna instruanto, Gilbert Niyukuri.

Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo

Por centoj da gejunuloj Internacia Junulara Kongreso estas ĉiam la plej ŝatata kaj la plej atendata jara evento. Ne nur pro la Esperantaj aktivaĵoj, ĝia amaseco kaj renkontiĝoj kun geamikoj, sed ankaŭ pro la eblo viziti diversajn landojn. La plimulto da aliaj junularaj jaraj eventoj okazas ĉiam en la sama lando, ofte eĉ en la sama loko, sed IJK flugas tra la tuta mondo, portante la internaciecon de la Esperanto-movado.



La 62-a Internacia Junulara Kongreso okazos inter la 6-a kaj la 13-a de aŭgusto 2006 en Sarajevo, la ĉefurbo de Bosnio kaj Hercegovino. Trifoje en la pasinta jarcento tiu urbo ricevis la tutmondan atenton. La unuan fojon en 1914, kiam tie okazis la atenco, kiu komencis la Unuan mondmiliton, la duan fojon en 1984, kiam tie okazis la 14-aj vintraj olimpikaj ludoj, kaj la trian fojon en 1992, kiam la urbo rezistis al la longtempa sieĝo. Tro da historio dum unu jarcento por la duonmilionhoma urbo! Sed la historio de la urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo ne estas limigita al la 20-a jarcento. Ĝi komenciĝis jam en la neolitika periodo kaj daŭris tra la Romia kaj mezepoka periodoj. La nomoj kaj la pozicio de la urbetoj ŝanĝiĝis (Aquae Sulphatum, Vrhbosna kaj Sarajevo), same la kulturoj kaj regnoj (Ilira, Romia, Bizanca, Kroata, Hungara, Bosna, Turka, Aŭstra-Hungara, Jugoslava kaj Bosnio-Hercegovina). Tiuj kondiĉoj kaŭzis interesan kulturan miksaĵon, malofte troveblan en la mondo. Viziti Sarajevojn estas kvaŝaŭ samtempe viziti Istanbulon, Sofion, Vienon kaj Novjorkon, ĉar oni vidas samtempe la diversajn arkitekturajn kaj vivmanierajn stilojn, kiuj vivas kune jam dum jarcentoj. Sufiĉe proksime unu al la alia oni trovas katolikajn kaj ortodoksan katedralojn, aŭ moskeon kaj sinagogon, la ebenan urbocentron, de kiu je nur unu kilometro troviĝas altaj montaroj, malnovajn metiojn, kiuj ekzistas en neŝanĝita formo jam kvincent jarojn, kaj la modernstilan vivmanieron.

Pro tiu simboleco de la multkultura vivo Sarajevo estis unu el la plej grandaj viktimoj de naciismaj atakoj fine de la dudeka jarcento. La urbo estis sieĝata inter 1992 kaj 1996, kaj barbare atakata ĉiutage. La plejmulto de la urbo nun estas renovigita. La multkultureca vivmaniero de la urbo, kvankam damaĝita, ne malaperis. Tiuj ecoj de la urbo influis ke la plej taŭga temo de la IJK estas "Multkultureco kaj Tutmondigo". Ĉu la interligo de la popoloj en la mondo kaj fluo de monda kapitalo nuligos specifajn

kulturajn identecojn kaj neŭtraligos la kulturon en la mondo, aŭ helpas disvastigon de diversaj kulturoj kaj pensmanieroj? Kiom diversaj multkultureco, kiu mem elkrederis en unu regiono kia estas Sarajevo, kaj la multkultureco kiu kreskas en la mondo kiel tutgloba vilaĝo?

La elekto de relative granda urbo, precipe ĉefurbo, por Internacia Junulara Kongreso, ne estas kutima decido dum la lastaj jaroj. Estas ofta opinio ke grandaj urboj povas malgrandigi la intereson de la kongresanoj por la kongreso mem, ĉar ili estas allogataj al aliaj eventoj. Aldone, la prezoj por la loĝado estas pli altaj en grandaj urboj kompare kun la kongresoj kiuj okazas en vilaĝoj.

Aliflanke grandaj urboj estas pli facile atingeblaj, kaj la ekstera influo de la kongreso, se ĝi okazas en granda urbo, estas pli sukcesa, ĉar pri Esperanto aŭdas tiam la tuta lando. Sarajevo jam unufoje organizis Internacian Junularan Kongreson en 1973. La tiam kongreso havis tiom gravan influon al la publiko, ke Esperanto-Junularo fariĝis unu el naŭ privilegiitaj junularaj organizoj en Bosnio kaj Hercegovino. Ĝi estis egalrajta al ekzemple Asocio de Ĉiuj Sportaj Organizoj aŭ Pionira Organizo, kaj kapablis post la kongreso organizi ne nur Esperantajn aktivaĵojn, sed ankaŭ internaciajn sciencajn seminariojn. Ankaŭ la kongreso mem estis ĉiutage televide sekvata. La rezultoj de tiu kongreso vivas ankoraŭ en la Esperanto-movado, ekzemple Pasporta Servo fondiĝis dum la IJK en 1973.

La nunaj kondiĉoj ne estas la samaj kiel antaŭ 32 jaroj. La milito en Bosnio kaj Hercegovino multe damaĝis la enlandan Esperanto-movadon. La organiza teamo tamen faros ĉion por ke en Sarajevo okazu bona Internacia Junulara Kongreso. La kongreso okazos en la nova parto de la urbo kun sufiĉe da spaco por diversaj kulturaj kaj sportaj eventoj. Ankaŭ la urbocentro estas facile atingebla de ĉi tiu loko, per tramoj, kiuj trafikas ĉiuminute. Por la homoj kiuj volas resti aldonajn tagojn en Sarajevo kaj pli ekkoni ĝian kulturon, indas diri ke antaŭ kaj post la kongreso en Sarajevo okazos diversaj someraj festivaloj («Novurbaj tagoj», «Sarajeva filma festivalo»).

La kongreso akiris la subtenon de la prezidento de la ŝtata registaro. Bosnio kaj Hercegovino estas lando kun nesimetria vizpolitiko, do la plejmulto de la partoprenantoj ne bezonas enirvizojn kaj povos veni facile. Malgraŭ la pasinta milito, la sekursituacio estas relative stabila, pli-malpli simila al la sekursituacio en la ceteraj eŭropaj urboj. La prezoj en la urbo estas favoraj, precipe por la servoj kaj manĝoj en restoracioj. La ekskursoj iros al la urbo Mostar, parto de Unesko-heredaĵo, kun sia mondfama ponto, kaj la suna Hercegovina regiono.

Pli da ĝisdatigitaj informoj pri la IJK en Sarajevo oni povas legi en la retpaĝoj www.esperanto.ba kaj www.tejo.org/ijk.
Samir Ribić



Ekskurso al muzeo en Zakopane dum la lasta IJK en Pollando.



Kongresa Komuniko 1

91-a Universala Kongreso de Esperanto Florenco, Italio, 29 julio – 5 aŭgusto 2006

Konstanta adreso

Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Retadreso: kongresoj@co.uea.org. TTT: www.uea.org/kongresoj/uk_2006.html.

Kongresa temo

La temo de la 91-a UK estas *Lingvoj, kulturoj kaj edukado al daŭrigebla evoluo*. Ĝian traktadon partoprenos la eminenta lingvopolitika fakulo François Grin, profesoro en la Universitato de Ĝenevo, kiu i.a. festparolos en la inaŭguro. La temregisoro, s-ro José Antonio Vergara, jovergaola@surfnet.cl, bonvenigas proponojn pri kontribuajtoj.

Informoj

La retejo www.ukflorenco2006.it, prizorgata de LKK, havas multajn informojn pri diversaj aspektoj de la UK kaj ili estas konstante pliriĝigataj laŭ la fluo de la kongresaj preparoj. Por aliĝoj kaj mendoj servas la ĝenerala kongresa retejo www.uea.org/kongresoj.

Kongresejo

La kongresejo *Palazzo dei Congressi*, Piazza Adua 1, troviĝas urbocentre, apud la ĉefa fervojstacio Santa Maria Novella. Origine ĝi estis vilao de la familio Strozzi. Nun ĝi estas moderne ekipita kongresejo kun ĉiuj komfortaĵoj por internaciaj renkontiĝoj.

Vojaĝado

Florenco estas facile atingebla buse, trajne kaj aviate. Ĝi estas konektita kun i.a. Romo, Bologna, Milano kaj Venecio per la rapida trajno Eurostar kaj kun aliaj urboj per normalaj trajnoj. Ĝi havas internacian flughavenon, 15 minutojn de la urbocentro. Al la pli granda flughaveno de la proksima urbo Pisa flugas malaltprezaj kompanioj. Veturi de Pisa al Florenco, trajne aŭ buse, daŭras ĉ. unu horon. Ambaŭ flughavenoj estas atingeblaj rekte aŭ per konektaj flugoj.

Loĝado

La *Dua Bulteno* ofertas diversprezajn hotelojn. Praktike ĉiuj hoteloj estos je promendistanco de la kongresejo. Ĉar la hoteloj en Florenco estas malgrandaj



kaj havas malmulte da ĉambroj, UEA ofertas pli da hoteloj ol kutime. La mendado malsimilas de antaŭaj UK-oj. La kongresanoj, kiuj uzos la paperan mendilon, ricevotan kun la *Dua Bulteno*, povos elekti hotelon laŭ kategorio/prezo kaj laŭ distanco de la kongresejo, sed ne laŭ la nomo de hotelo. Tiuj, kiuj uzos la retan mendilon en http://www.uea.org/kongresoj/uk_2006.html povos elekti difinitan hotelon. Krom hoteloj, oni ofertas ankaŭ favorprezajn studentajn loĝejojn kaj lokojn en amasloĝejoj.

Ekskursoj

Kongresanoj povos elekti inter diversaj ekskursoj tra Italio, Toskanio kaj Ĉirkaŭaĵo de Florenco. Priskriboj aperos en la *Dua Bulteno*.

Unua Bulteno

La *Unua Bulteno* estis jam vaste distribuita. Unuopuloj povas ankoraŭ peti ekzempleron ĉe la konstanta adreso.

Kongresa afiŝo

Impona kaj belega afiŝo (99x69cm) pri la 91-a UK, kun la kupolo de la gotika katedralo Santa Maria del Fiore, estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Ĝi kostas 4,80 eŭrojn (plus afrankon kaj, en EU, imposton de 19%). Triona rabato ekde 3 ekz.

Glumarko

La kongresa glumarko (4x5cm) estas mendebla ĉe la Libroservo de UEA. Folio kun 12 pecoj kostas 1,20 eŭrojn (plus afrankon kaj, en EU, imposton de 19%). Triona rabato ekde 3 folioj.

Aliĝilo

La aliĝilo estas ricevebla ĉe la perantoj kaj ĉe la konstanta adreso. UEA volonte liveros grandajn kvantojn por distribuado kun E-gazetoj kaj en E-arangoj. Eblas elŝuti la aliĝilon en PDF-formato ĉe la kongresa TTT-ejo, kie eblas ankaŭ rete aliĝi al la UK.

Kotizoj

Ĝis la 31-a de decembro 2005 validas jenaj kotizoj (interkrampe tiuj por la landoj de kat. B):

Individuaj Membroj de UEA (sed ne MG) EUR 160,00 (120,00);

MG-membro aŭ ne-IM de UEA EUR 200,00 (150,00);

Komitatano/kunulo/junulo/handikapulo, IM de UEA, EUR 80,00 (60,00); Kunulo/junulo/handikapulo, ne-IM de UEA, EUR 120,00 (90,00).

Infanoj kaj junuloj naskiĝintaj post la 31-a de decembro 1985 aliĝas senpaga (bv. sendi kopion de dokumento).

Pagmanieroj troviĝas en la aliĝilo, *Jarlibro 2005* (p.37-38) kaj en TTT.

Leterkesto

Esperanto ne estas mirakla ĉiosolvilo

Laŭ Andreo Marszałkowski (majo, p. 107) la kalkuleblaj *kostoj de la tradukadoj de kunvenoj kaj dokumentoj formangas pli ol 30 procentojn de la buĝeto de Eŭropa Unio*. Strange ke la oficiala organo de UEA senkontrolle aperigas malĝustajn pri temo tiel grava por nia lingvopolitiko, dum en alia UEA-eldonaĵo („Ĉu nur-angla Eŭropo?” de R. Phillipson, p. 117) klare legeblas: *Tradukado kaj interpretado ĉe ĉiuj eŭropaj institucioj kostas 0,8% de la tuta EU-buĝeto*. La informo de Phillipson fontas el 2001, sed komuniko de la Eŭropa Komisiono en januaro 2005 konfirmas ke ankaŭ post la pililarĝigo en 2004 plu temas pri 0,8% de la EU-buĝeto (resp. pri 13% de la administraj kostoj de EU). Kompreneble, ankaŭ tiuj 807 milionoj da eŭroj estas enorma sumo, sed 40-oble malpli ol diras la artikolo.

Margene rimarkite: mi dubas ĉu vere /Romano/ Prodi gvidis la ĝeneralan debaton la 23-an de februaro en la parlamentejo. Laŭ la protokolo de tiu tago, la debatojn alterne gvidis la prezidanto de la Parlamento, Josep Borrell, kaj pluraj vicprezidantoj, inter kiuj la pola Janusz Onyszkiewicz.

Plej grave, tamen: ne servas al nia afero sterile kontraŭstarigi Esperanton kaj Eŭropan multlingvecon. Ambaŭ ja estas aferoj pozitivaj kaj kultivindaj. Esperanto ne estas mirakla ĉiosolvilo: se morgaŭ ĝia oficiala uzo estus enkondukita en Bruselo, ni esperantistoj trovus nin en stato alarma kaj gape senprepara. **István Ertl (Luksemburgio)**

Kompletigita Plena Verkaro

En la revuo sur la paĝo 115 mi legis sub *Persone* artikoleton pri Andersen. Tie oni diras, ke liajn fabelojn eblas legi en Esperanto en kvar volumoj, eble malfacile troveblaj ĉe libroservoj ktp, kaj oni poste indikas retan adreson.

Nu, bone. Sed kial oni ne mencias la komunan eldonon de ĉiuj de Zamenhof tradukitaj fabeloj de Andersen en la serio *Jam kompletigita Plena Verkaro de LL. Zamenhof de s-ro Itō Kanzi* (Ludovikito)? Tiu volumo nomiĝas *Fabeloj de Andersen* kaj unufoje aperis en 1990.

Iom simile: plurfoje mi konstatas ke oni mencias la t.n. *Lingvaj Respondoj* de Zamenhof, sed ĝian plej ampleksan eldonon oni oftege prisilentas: en la sama serio ĝi aperis sub la nomo *Lingvaj Respondoj de Ludovikito* ankaŭ en 1990; tio estas la sepa eldono, editorita de Gaston Waringhien.

Gerrit Berveling

La (mal)benitaj krucenigoj

Antaŭe, kiam mi malfermis la revuon *Esperanto*, granda plezuro por mi estis konstati, ke foje mi havas la ĝojon partopreni en la krucvorttenigma konkurso. Kial do nun, de post ses monatoj ne plu aperas krucenigoj en la revuo tiel kara al mi? Mi enuas...

Ĉu sufiĉis por tio, ke iu malamiko de kulturo skribis en la (ankaŭ malaperinta) kuriero de legantoj, ke la krucenigoj naŭzas lin kaj ke ili okupas tro da spaco en la revuo? Ĉu ankaŭ sufiĉis, ke oni ŝafe obeu lin? Ĉu ankaŭ sufiĉis eble, ke aliaj krucenigmoamantoj silentu, ŝajnante akcepti tiun hontindan malaperon? Estas aliaj francaj samideanoj: D. Luez, L. Marin, L. Giloteaux..., kiuj estis fidelaj al la krucenigoj kaj kiuj certe bedaŭras ilin. Eble iun tagon ankaŭ ili plendos! Mi deklaras, ke mi perdos la intereson pri la revuo kaj eĉ

bedaŭros ke mi iĝis ties dumviva abonanto, se ne reaperos en tiu amata revuo miaj karaj krucvorttenigmaj, kiuj helpas min travivi mian malfeliĉan solecon (mi vidvas jam de naŭ jaroj).

Povas esti, ke pro abundo da presotaj urĝaj artikoloj (ekz. kongres-raportoj) ne estu krucenigoj unu aŭ du fojojn sinsekve, sed ke tio okazu dum pluraj monatoj mi rifuzas!

Kun antaŭdanko kaj koraj salutoj

J. Ducrocq (Francio)

Rimarko de la redaktoro (kaj la aŭtoro de la krucenigoj): mi opinias ke ni “malvenkis la balotojn”. Kie estis la krucenigmo-satantoj, kiam oni “balotis” (enketis) pri la revuaj rubrikoj? Bedaŭrinde montriĝis, ke niaj “kaprompiloj” ne estas por la plimulto tiel ŝatataj, kiel ni imagis. Nu, eble kompromiso: ĉu tamen almenaŭ unufoje jare? (La satantoj konvinku min!)

La koboldo laboris diligente

Mi rigardis ĉe la TTT-ejo de UEA la oktobran numeron de *Esperanto*. Tie estas informo pri la kongresa kunveno pri redaktado de revuoj, en kiu mi partoprenis. Bedaŭrinde en la informo estas eraroj. Mi (redaktoro de *REGO*) estas nomita Nikolaj Gudskov, sed ne Georgij Kokolija. Ankaŭ malĝusta estas la informo pri presisto-ekspedisto, ĉar tiu kunlaboranto estas nur presisto, pri la ekspedado okupiĝas mi mem. Verŝajne jam ne eblas fari korektojn, sed estus juste publikigi la korektojn en la novembra numero.

Garik Kokolija (Rusio)

Respondo de la redaktoro: Sinceran pardonpeton al s-ro Kokolija! La aŭtoro eraris kaj nek la redaktoro, nek la provleganto (kia koincido: la unua kaj la tria estas la sama persono) tion rimarkis.

La nove-malnova PIV

En ĉi tiu periodaĵo (novembro 2004) aperis en la rubriko “Forumo” artikolo (“Esperanto: la lingvo kun generacia problemoj”) en kiu la aŭtoro (Anna Löwenstein) debatas pri eroj de *La Nova PIV*. Nu, la artikolo donas la impreson (per “la lingvo”), ke aliaj lingvoj ne spertas la saman fenomenon, sed efektive la samo okazis en Usono ĉe la apero de la tria eldono de la plena vortaro de Merriam-Webster. Iu recenzisto trafe resumis la diferencojn inter la dua kaj tria eldonoj: *La dua eldono finis debatojn, ne estigis ilin!* – Kaj la paralelo estas eĉ pli forta se ni konsideras *PIV* esti la dua eldono de *PV*, kaj do la “nova” estis, ĝuste, la tria eldono!

Löwenstein neglektas plendi pri la plej malforta punkto de la libro: la titolo mem. Oni povas marki ion *malnova*, sed oni neniam povas, efike, marki ion *ajna nova*.

Mike Jones

Pri la enhavo de la revuo

Ĝis mi legis la decembran numeron de 2004 de la revuo *Esperanto*, precipe la artikolon pri la enhavo de la revuo. Mia opinio la revuo estas redaktata bonege, longaj artikoloj devas esti longaj, ĉar mallongaj estus sensencaj, en nekrologoj mi ofte ekscias la plej bazajn informojn pri la forpasintoj, la krucenigoj estas gravaj, ĉar Esperanto estas ne nur serioza afero, sed ankaŭ amuzaĵo. Redaktu la revuon plu same bone kiel ĝis nun.

Jiří Patera (Ĉeĥio)



Navige tra TTT-paĝoj

Jen pluraj verdaj gutoj el la informoceano de Tut-Tera Teksaĵo. Sciigu la redakcion pri pliaj konsultindaj paĝoj Esperantaj!

INSTRUADO, LERNILOJ:

E-kursoj: En la paĝaro www.edukado.net eblas registri la oficialajn Esperanto-kursojn. En la datumbazo estas 56 lernejoj el 25 landoj kun entute 1182 lernantoj. Se vi bezonas helpon, turnu vin al la redaktoro Katalin Kováts: redaktanto@edukado.net. Bonvolu informi la instruistojn en via lando!

Vortaro: Reta Esperanta vortaro por 28 lingvoj kun specialaj komputilaj programoj, senpage elŝuteblas ĉe: <http://perso.wanadoo.fr/la-vortaro/index.html>.

Vortmemorigilo: sur la retpaĝo www.lerni.info estas helpilo por lerni vortojn. Ĝi ekzistas en tri lingvoj: Esperanto, la angla kaj la germana.

LANDOJ, REGIONOJ:

Brazilo: Pri la venontjara solenaĵo okaze de la centjariĝo de E-klubo en Brazilo kaj la brazila E-kongreso en Campinas informas la TTT-ejo: www.esperanto.cc/centenario.

Ĉeĥio: La urbo Moravské Budějovice havas, dank' al s-anoj Viktor Dvořák kaj Zdeněk Hřel, sian oficialan retejon ankaŭ en Esperanto: www.mbudejovice.cz/html/es_historie.htm. (Miroslav Malovec)

Francio: Novaĵojn pri la vivo de la franca SAT-Amikaro eblas trovi ĉe: <http://satamikarohm.free.fr/>, aŭ www.esperanto-sat.info; www.esperantoecuador.galeon.com.

Slovenio: La plej granda TTT-ejo pri Slovenio krom la slovena kaj la angla uzas ankaŭ Esperanto. Ĝi estas parto de granda monda projekto kaj esperantistoj de Maribor, kadre de preparoj por EEU-kongreso en 2007, aperigas ĉiujn tekstojn en Esperanto: www.burgersi/SLOIndex.htm. (Zlatko Tišljär)

FILATELO:

Listo kaj bildoj de poŝtmarkoj eldonitaj favore al Esperanto troveblas ĉe: <http://dauphin.guy.free.fr/>. La aŭstria E-temaj poŝtmarkoj videblas ĉe: www.persmarken.com/mummern-alle.html/esperanto.html kaj www.personalisierte-briefmarken.at/1483199.htm. (Walter Klag)

Tuvio: Poŝtmarkojn kaj historion de la jama sendependa ŝtato en Centra Azio vi trovos sur la TTT-ejo: www.006.ipp-so-net.net/jp/tuva.

NOVAĴOJ:

Raporto: www.raporto.info estas nova, liber-esprima raportejo, kie oni povas legi, raportoj kaj komenti novaĵojn pri nia mondo.

Startu: Ĉu vi volas scii kio okazas en Esperantujo sed ne volas viziti multajn retpaĝojn? www.startu.net povas esti via startpaĝo kun multaj rektaj ligoj al multaj E- retpaĝoj.

KONGRESOJ:

UK Florenco: Informoj pri la venonta UK troveblas ĉe: www.ukflorenco2006.it. Ĝi celas ĉefe informi italajn pri Esperanto kaj E-Kongresoj, kaj funkcias lige kun la paĝaro

www.esperanto.it. Informoj por E-gazetaro: www.ukflorenco2006.it/unikodo/llk_informas/agadoj.llk/informado_eo/informite/. Printebla aliĝilo elŝuteblas ĉe: www.uea.org/pdf/aliĝilo_florenco.pdf.

IJK: Aktualaj informoj pri la venonta Internacia Junulara Kongreso en Sarajevo estas ĉe www.esperanto.ba kaj www.tejo.org/ijik.

SAT-Kongreso: Se vi ankoraŭ ne aliĝis, sed deziras pasigi semajnon en Beograd (Serbio kaj Montenegro) dum la 79-a SAT-Kongreso (19-26 08 2006), vizitu la ttt-paĝon de la kongreso: <http://users.pandora.be/jakvo/SAT/SAT-Beograd.html>.

Brokantaroj: Nova ret-brokanterio ofertas al individuoj la eblon vendi brokante librojn kaj revuojn. Bona solvo por serĉi, trovi kaj vendi (ne)bezonatajn titolojn: www.booklooker.de.

UNIVERSITATOJ:

Pollando: Pri la Interlingvistika Studo en la Universitato de Adam Mickiewicz informas: www.staff.amu.edu.pl/~interl/index.html kaj http://www.edukado.net/es_anonco.jsp?id=178. Kontaktpersono: Ilona Koutny, ikoutny@amu.edu.pl.

Ĉinio: Fotoj pri la Ĉina E-Movado troviĝas en retpaĝoj de ĉina universitato: www.bjgaa.com/esperanto/index.htm. Interesiĝantoj pri internacia kunlaboro pri edukado kontaktu: cuijiayou@yahoo.com.cn.

Svislando: Ĉe la Universitato en Ĝenevo estas observejo "Ekonomio-Lingvoj-Trejnad", kies retpaĝoj uzas ankaŭ la Internacian Lingvon: www.unige.ch/eti/elf.

Nederlando: La Amsterdama universitata biblioteko, posedanta kolekton de libroj en/ pri Esperanto (pli ol 3000 titoloj) estas rete konsultebla: <http://opc.uva.nl>. Alklaku la supran ligon Catalogus... (Catalogue...). En la serĉlinio zoeke en/ search tajpu *tac esp* kaj konfirmu. Vi ricevos respondon kun 3104 trafoj, kiuj estas la E-kolekto, ekrane trairebla en sia tuta amplekso. Eblas serĉi ankaŭ laŭ titolo, aŭtoro ktp. (Wim Jansen)

San-Marino: Gazetaraĵo komuniko de AIS San-Marino legeblas ĉe: www.ais-sanmarino.org/pr/eo.

MEDICINO, SANO:

Terapio: La retpaĝo "psikodinamika terapio de erektiĝa malfunkciado", en la lingvoj germana, angla, hispana kaj Esperanto, troveblas ĉe: www.psychotherapie.bendias.de/erektionsstoerungen/.

Naturkuracado: www.naturkuracado.info, instalita de natukuracisto Harald Schicke, Germanio, volas kolekti informojn pri naturkuracado en Esperanto. Eblas kontribui per artikoloj kaj al la forumo.

MUZIKO:

Germanio: Studio de bardaj kantoj "Bordo"

en Numburgo, Germanio, alportas informojn pri novaĵoj muzikaj E-eventoj: <http://eo.bereg.vorota.de>.

Brazilo: Neide Barros Rego komponis muzikon por la Zamenhofa poemo *Ho mia kor!*. La muzika versio kantata de Neide mem estas aŭskultebla kaj elŝutebla en la retpaĝaro de Kultura Kooperativo de Esperantistoj: www.kke.org.br (Muzikaro).

VIVSTILO:

Makrobiotiko: Informojn pri makrobiotika vivad-teorio kaj vegetarismo alportas la retpaĝaro www.makrobiotiko.it.

Alter-Nativa: Pri interesaj aktivaĵoj de la civitana unuigo en Slovakio (komunumo klopodanta pri alternativa vivmaniero) oni povas legi ankaŭ en Esperanto ĉe: www.alternativa.sk/es/.

RADIO:

Radioarkivo: Esperanto-Radio-Arkivo estas listo de radioj, elsendantaj en aŭ pri Esperanto, kaj kolekto de son-dosieroj en MP3-formato. La retadreso estas <http://radioarkivo.org>.

Radio Verda: En la retejo <http://xonus.com/radioverda/> oni povas, helpe de nova elsenda sistemo per MP3-dosieroj, aŭdi esperant-lingvajn elsendojn.

INFORMADO:

UEA: en www.uea.org/informado troveblas informoj rekte utiligeblaj aŭ adapteblaj por viaj bezonoj. Aliaj informoj troveblas en www.tejo.org/uea/proponatoj_informiloj. En www.tejo.org/uea/tekstoj_de_Claude_Piron estas ligoj al tekstoj de Claude Piron en pluraj lingvoj. En la paĝo www.tejo.org/uea/dokumentoj_pri_informado_de_landaj_kaj_fakaj_asocioj_estas_tekstoj_ĉefe_pri_eŭropaj_lingvaj_problemoj.

Raporto-Info: La panamano Roberto Pérez-Franco kreis novan retejon, en kiu li strebas kolekti novaĵojn el la tuta mondo. Ĝia celo estas unuavice elbligi al esperantistoj mem raportoj pri temoj, kiujn ili opinias gravaj: <http://raporto.info>.

LIBROJ, REVUOJ:

IKU-Libro: La libro kun prelegoj de la Vilna Internacia Kongresa Universitato estas ĉe la dokumentoj de UEA: <http://uea.org/dokumentoj>. La rekta adreso de la dosiero estas <http://uea.org/pdf/IKU2005.pdf>.

Reta Infana Revuo: Aperis la unua numero de la infana revuo *La Luno Rakontas* ĉe: <http://ateliero.net/la-luno-rakontas/>.

ARTO:

Brazilo: Por vidi arton el Brazilo Nordoriento en Esperanto, de la Arta Muzeo de la Federacia Universitato de Cearao, klaku: www.mauc.ufc.br/historia/historia.eo.htm.

Reagoj

La kontribuoj aperantaj en tiu ĉi rubriko esprimas la opiniojn de siaj aŭtoroj, kaj la redakcio ne respondecas pri ili.

Nova fazo

Evidente en la vivo de la Esperanto-movado okazas io tute nova. La klasika 120-jara ideologio de neŭtraleco komencis cedi al politikiĝo de niaj metodoj. La movado ekkonsciis pri si kiel socia forto, kiu decidis publike batali por siaj celoj.

Ĝis nun esperantistoj ne agnoskis ke ili mem estas ia aparta kolektivo, sed daŭre pretendis esti movado, kiu reprezentas la mondon (la homaron, kiu bezonas komunan lingvon, sed ne konscias pri tio). Ideoj pri la memidenteco en la pionira tempo kaj la epoko de Lapenna estis praktike malpermesitaj. En la okdekaj jaroj ekkreskis la raŭmismo, kiu ankoraŭ ne parolis pri politikiĝo, sed komencis laŭtigi siajn ideojn, ke ja esperantistoj havas sian grupidentecon. La Itala Radikala Partio, malgranda, sed parlamenta partio, jam en la naŭdekaj jaroj komencis malferme trakti la lingvan neegalecan problemon kaj ekagis por diskonigi Esperanton kiel solvon por tio. En 2003, dum Italio prezidis Eŭropan Union, la Radikala Partio dramece elbatalis en la ministerio por Edukado sindevigon iniciati en EU ekesploron pri la eblo uzi Esperanton kaj unue financi eksperimenton pri lernado de tiu lingvo. Fine de 2003 la kongreso de Asocio de Radikalaj Partioj de Eŭropo en Bruselo konfirmis la subtenon al Esperanto kiel ebla eŭropa komuna lingvo. Samjare en Bruselo ekfunkciis Centro por Dokumentado, en kiu profesie agis du junaj aktivuloj kaj kies agadon finance subtenis UEA. La lobia karaktero de ilia aktivado estis ege utila, ĉar gravuloj de EU estis regule atentigitaj pri lingvaj demandoj kaj la Esperanto-gvidantaro pri ŝancoj fojfoje aperantaj en Eŭropo. Kaj la pintono de tiu politika agadlinio ni

travis pasintjare. Kuraĝe novan ŝancon vidis aro da francaj esperantistoj, gvidataj de Christian Garino, en parlamentaj balotoj de EU. Ili sukcesis organiziĝi eĉ en 7 francaj departementoj kaj oficiale kandidatiĝi listojn de Eŭropo-Demokratio-Esperanto (E-D-E) kaj partopreni kiel unu el trideko da partioj en la balotoj. Sekvis la ideon unu germana departemento, sed iom tro malfrue kaj ĝi ne sukcesis kolekti sufiĉe da subskriboj por rajtigi la grupon partopreni en la balotoj.

La rezulto de E-D-E en Francio estas laŭ mi tre stimula. Kvankam neniu E-D-E-kandidato estis elektita, tamen aperis la unuan fojon kiel novuloj en balotoj sur kvinona teritorio de Francio kaj gajni inter 0,1 kaj 0,24% sume pli ol 25.000 voĉojn, estas grava sukceso. Tio klare indikas, ke necesas daŭrigi la marŝadon sur tiu ĉi vojo.

Surprize elektigis esperantisto en alia lando kiel nova EU-parlamentano. Ja kiu lando havu la honoron esti la unua – la lando de Zamenhof. Sinjorino Margareta Handzlik klare esprimis post la elektigita sian intencan en la parlamento agi ankaŭ por Esperanto. Se ni aldonas al tiu agado certan flankan kaj bizaran aktivadon, kiu tamen estas politika, tiun de Esperanto-Civito, ni vere devas konstati: nova vento ekblovis. Ne plu neŭtralaĵ politike – nun ni batalu per politikaj rimedoj!

Zlatko Tišljär

Schwartz: la TTT-ejo "La rido kaj vervo de Raymond Schwartz" prezentas novaĵojn: plian leteron de la verkisto, foton de kabaretojn kaj reklamojn de "La Verda Kato" (lia kabareto en la 20-aj jaroj de la 20-a jc): www.esperanto.cc/kabareto. Novaj materialoj pri ŝvarcaj kabaretoj bonvenas.

(James Rezende Piton)

Danio: La hejmpaĝo www.chifonoj.dk enhavas artikolojn pri Hans Christian Andersen kaj tradukojn de liaj fabeloj. La hejmpaĝo faris danaj esperantistoj okaze de la 200-jara naskiĝdatreveno de la fama dana fabelisto. (Lars Kromann)

EVA: Arkivo de la EVA-anguloj, aperintaj en nia revuo ekde julio 2004, troviĝas sur la retpaĝoj de Esperantlingva Verkista Asocio: <http://www.everk.org/index.php?evaanguloj>.

FAKOJ KAJ APLIKOJ:

UEA-Vikio: sur la retpaĝaro de UEA www.tejo.org/uea/UEA-Vikio troveblas informoj pri Faka kaj Scienca Agado, serĉataj aktivuloj, daŭraj agadoj, lingvaj homaj rajtoj, Ne-Registaraj Organizaĵoj, tradukprojektoj, asocioj, babilejoj, diskutgrupoj, eventoj, kursoj, oftaj demandoj, radioj, televido, terminologio ktp.

Interlingvistiko: Interlingvistika Esperanto-Grupo celas la diskutadon pri kulturo,

interlingvistiko, ekolingvistiko, lingvistiko. Vizitu: <http://groups.google.com.br/group/interlingvistika-eo>. (Leite Jr)

Etnismo: Internacia Komitato por Etnaj Liberecoj (IKEL) komencis publikigi sian bultenon *Etnismo* en la reto. Sur la IKEL-retejo www.geocities.com/ikeld eblas legi la antaŭlastan numeron kaj "gustumi" la lastan. La iniciato ripetigos ĉiujfoje kiam aperos nova numero. (Daniele Vitali)

Astrologio: esperantistoj estas petataj aliĝi al nova E-fako pri Astrologio – Astrologia Esperantista Klubo: esperanto.chile@gmail.com.

Korespondado: Internacia Koresponda E-Klubo de Amikoj invitas vin konatiĝi kun la paĝaro <http://www.ikeka.nm.ru/ikeka>.

Babilejo: Gangalo, la plej granda interreta portalo en Esperanto, invitas al sia nova babilejo: <http://gxangalo.com/babilejo/>.

Ŝako: Provante reorganizi la Esperantistan Ŝak-Ligon Internacian ni fondis la liston: esperanta-sxak-ligo-internacia@yahoogroups.com. Bonvolu sendi alig-mesaĝon al: esperanta-sxak-ligo-internacia-subscribe@yahoogroups.com.

Ludo: La ludo "Maniac Mansion" (freneza domo) popularigis novan ludstilon en la

mondo. Pasintjare internacia volontula skipo relancis la ludon, kun pli bona grafiko por modernaj komputiloj. Nun ĝi estas elŝutebla ankaŭ en Esperanto: http://people.freemove.com/lucasfngames/maniac/index_eng.htm (Our Games).

Historiaj filmoj en Esperanto estas senpage kopeblaj kaj rigardeblaj ĉe <http://jmw.neostrada.pl>. (Ĉielismo)

Turismo: Du studentoj organizis vojaĝon el Francio al Ĉinio, laŭ la Silka Vojo. Ili ekternis Esperanton por havi pli da kontaktoj kun la loĝantoj de la trapasotaj landoj: http://esperanto.angers.free.fr/spip/breve.php?id_breve=24.

Komerco: Hejmpaĝo de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo kaj forumo por "ikefanoj" troveblas sur la retpaĝaro www.ikef.org. La revuo *La Merkato*, organo de IKEF, disponeblas ĉe <http://users.pandora.be/ikef/lm90.pdf> (71 kB).

Libera programaro: Ĉu nia movado estas tro fermita? Ĉu esperantistoj interesiĝas nur pri la lingvo mem? Ĉu eblas inspiriĝi per la ekzemplo de la "movado de libera programaro"? Legu kaj diskutu ĉe <http://skej.esperanto.sk/artikoloj.php?lingvo=eo&akcia=clanok&ID.clanok=146>. ☆

Kulpigi la politikistojn ne sufiĉas

Prave kontraŭmetas J. Książek la relative rapidan akcepton de la ideoj de Einstein kaj la oficialan neakcepton de Esperanto dum 115 jaroj ("Problemoj de Einstein", *Esperanto*, nov. 2003), sed miaopinie lia konkludo: *kulpas la politikistoj restas sen aktiva alternativa strategio.*

Fakte la menciita kontraŭdiro apartenas al pli larĝa kultura demando: *Kial la scienc-teknika progreso (STP) senkompare pli rapidas ol la spirita progreso (SP) – do politika, norma, estetika ktp?* La kulturteorio donas jenan respondon: La veraĵoj de STP estas intuicie videblaj, montrebaj per laboratoria eksperimento aŭ matematike demonstreblaj, ili malkovras la misterojn de la naturo, aldonas al la homaro la fortojn de la naturo; ili havas universalan validecon. La veraĵoj de SP havas nur etparte tiajn ecojn; precipe ili falas en la kavon de la sociaj kontraŭdiroj, vundas privilegiojn de iuj homgrupoj, neas tradiciajn kutimojn kaj antaŭjuĝojn, postulas gravajn, libervolajn ŝanĝojn de pensmanieroj. La novaj akiraĵoj de STP povas decidi pri vivo aŭ morto de homgrupoj, tiuj de la SP ne. Tial estis gravegaj la vortoj de Jesuo: *Ŝanĝu vian pensadon*. Ĝuste tiu ŝanĝo estas la ĉefa problemoj en la socia evoluo, sed la sociologio avertas: Ju pli profundaj estas la ŝanĝoj postulataj de iu SP-veraĵo, des pli malrapide tiu ĉi antaŭenmarŝas; ne la veraĵo estas utopio, sed la kredo, ke ĉiu veraĵo devas akceptiĝi rapide. La racio de multaj validaj ideoj (paco, frateco, egaleco kaj justeco, racia vivo ktp) ne sufiĉas/as por ties mondvasa efektivigo; pro tio ni ne povas simple kulpigi iun socian kategorion, kvankam ne ĉiuj profesioj estas "egaldistancaj" de certaj ŝarĝoj. Por sukcesigi gravajn agadojn necesas larĝa preparo de la homaj spiritoj. Firma decido estas ne komenca, sed fina akto de la evoluoj.

Esperanto, kiel ideo, estas tipa ekzemplo de SP kaj renkontis/as la kutimajn obstaklojn. Kiu ne komprenas la objektivon de tiuj certatempaj obstakloj, ja la neeviteble sinuosidan, zigzagan, kontraŭdiran vojon de nia movado, tiu povas fariĝi pesimisto, defetisto aŭ renegato. Ankaŭ simpla "kredo je sukceso" kaj hobiismo ne solvas la problemojn. Oni devas vidi kaj aktivigi la sociajn kategoriojn kiuj plej proksimas al nia ŝarĝo, kiuj do "respondeblas" pri la sorto de ideoj en la moderna mondo kaj rolas kiel opini-gvidantoj.

Kolekti, krei, defendi kaj disvastigi la akiritajn veraĵojn estas neekskluziva, sed specifa kaj morala devo de la scienco.

Nu, samkiel aliaj iniciatoj, ankaŭ Esperanto havas siajn kapitulacantojn kaj renegatojn. Iuj eĉ kabeigas ne silente, sed krias sur la strato sian apostatecon, aldonante proprajn erarojn al la konfuzoj de aliaj aŭtoroj, kiuj anstataŭ pliriĉigi nian kulturon, komencis nei la jam de longe elpruvitajn principojn de Esperanto. Ni ne okupiĝu ĉi tie pri ili.

La vero estas ora peco kuŝanta en la profundo de la naturo, de la socio kaj konscio. La politikistoj havas nek tempon nek intereson okupiĝi pri tiaj senprofitaj esploroj, multaj eĉ ne atentigas demokratiajn ideojn antaŭ ol tiuj estas akceptitaj en prestiĝaj intelektularaj medioj aŭ, pli bone, en larĝaj tavoloj de la loĝantaro. Neniu espero, ke ili fariĝos pasiaj apostoloj de la vero, kio povas damaĝi al politikaj karieroj. Necesas intima rilato al la vero, arda deziro disvastiĝi ĝin por la bono de la homoj. Sciante, la sciencistoj, la intelektularo ĝenerale "respondeblas" pri la sorto de ideoj,

kvankam ankaŭ en tiu ĉi kategorio multaj estas nur "funkciuloj", "dungitoj", kapablaj aplaudi la novan ideon, sed ne riski ion por ĝi. Estas ege raraj grandaj karakteroj firme engaĝitaj en la progreso de la vero, defendante ĝin sinofere. Tiel naskiĝis la popolaj mitoj pri la neceso de la "morto" por sukcesigi gravajn iniciatojn, fini grandegajn konstruaĵojn k.s. Ne la morto mem gravas, sed oni ne mortas por sukcesigi neniaĵojn. Post la morto de Jesuo, liaj ideoj venkis la romian imperion.

Konklude – kaj tion montras nia historio – ni bezonas pasiajn klerulojn, kiuj kuraĝe, prestiĝe, altnivele, plurflanke prezentu al la mondo la novan veron, por ke la cetera intelektularo, la junularo, sufiĉe granda nombro el la loĝantaro komprenu, ke temas pri ĝia grava, aktuala problemoj, ne pri revaĵo de esperantistoj. Tamen tio ne estas universala agadmodelo. La problemoj trovas sian favoran teron en lingve diskriminacitaj landoj, minoritatoj, regionoj, en porpacaj kaj kontraŭtutmondiĝaj movadoj, en fratecaj sentoj de iuj religioj ktp. Seriozaj politikistoj ne atendos ĝis la fino de tiu klariga procezo...

Ni iom rigardu sukcesajn praktikojn de nia movado. Miaopinie la ĉi tie skizita koncepto estis ankaŭ tiu de Zamenhof, Privat, Lapenna k.a. Dum la UK en Berlino (1999) oni memorigis notindajn sukcesojn de simila agadmodelo en Bulgario dum certa fazo. Gravulo de UEA konsideris tiun vojon "tro longa"; li volis rapidan sukceson ĉe la internaciaj organizaĵoj. Tamen montriĝis prava la popola proverbo: la rekta vojo povas esti pli longa. Nu, kiom longa povas esti la "nerekta vojo"?

Ni memoru almenaŭ unu el la iom konataj faktoj: En Rumanio, kie faŝistoj kaj stalinistoj jardekojn persekutis nian ideon, du universitatoj, helpe de kelkaj siaj kolegoj kaj de 4-5 esperantistoj, sukcesis, de 1970 ĝis 1978, post prelegoj kaj kontaktoj en sciencaj medioj, memuaroj ktp, signife "ŝanĝi la pensadon" en la lando, motivi ŝtatajn instancojn adopti decidojn favore al Eo, spite al ankoraŭ valida cenzura malpermeso: Oni kreis E-kolektivon en la Akademio pri Sociaj Sciencoj, E-sekcion en la Tutlanda Societo de Filologoj, enkondukis E-kursojn en la filologiajn fakultatojn (helpis ankaŭ la kontakto de Tonkin kun la vicministro pri klerigado), oni aperigis ses E-lernilojn – kiujn postulis pli ol 3000 personoj, precipe gestudentoj ktp. En 1990 (helpis H. Frank) la ministerio rekomendis al ĉiuj fakultatoj enkonduki E-kursojn (se oni disponas pri instruistoj). En la universitato de Timișoara ekfunkciis 14 kursoj. Ĉion ĉi faris kelkaj personoj sen asocio, revuo k.s., sub diktatura reĝimo. Kaj la politikistoj? En publikaj debatoj iuj sincere konfesis ke "nur nun" ili komprenas la sencon de Esperanto, apogis nin kaj defendis nian agadon.

I.F. Bociort



Ĉu mi lernos Volapukon?

Vortaro Volapük-Esperanto kaj Esperanto-Volapük. André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2003. 207p. 21cm. Prezo: € 15,00

O larnob-li Volapüki? No, danö !* En sia grava interlingvistika eseo de 1898, Zamenhof aplombe skribis ke ... *nenie (...)* troviĝis eĉ unu persono – ni ripetas, eĉ unu – kiu transirus de Esperanto al Volapük! Neatendite, Volapuko (reformita en 1931) ne plene formortis, sed jam de longe ĝiaj kelkdek fideluloj plejparte posedas Esperanton. Jen dudirekta malgranda vortaro, kiun akompanas lernolibro... La etimo de ĉiu Volapuka kapvorto indikas, kio rimarkigas la plejoftecon de la angla kaj germana kiel fontlingvoj, kaj la kernan aliformigon eĉ kripligon de pluraj vortoj pro la devigo eviti komencajn kaj finajn vokalojn, kohere kun la kompleksaj vortfara kaj verba

sistemoj. Ne mankas modernaj (xaf-fakso, *nünömvav*-komputiko). Dise troviĝas kelkaj bildoj, inklude de la 6 ĝisnunaj *cifals* (ĉefestroj). Ĉu nia leksikografio ne havas pli urĝajn taskojn? Nu, almenaŭ Volapuko povas servi kiel esplorobjekto de kompara Esperantologio, kiel montrite de Zamenhof mem, Bernard Golden (germana komponanto de Esperanto) kaj Árpád Rátkai (ligoj kaj historia kontinueco inter ambaŭ movadoj). *Ĉu mi lernos Volapukon? – Ne, dankon!

José Antonio Vergara



Bonega jarfina donaco

Kristnaska kordo. Akordo. 2003. KD. 59 min. Kun 16-paĝa tekstlibreto. Prezo: € 15,00

Kristnaska kordo estas la dua KD de la nederlanda koruso Akordo. Koncerton de tiu ĉi grupo ni spektis unuafoje en Parizo dum la Eŭropa Kongreso en 1995, duan fojon en la UK de Prago en 1996, kaj lastfoje ĉi-somere en la UK de Vilno. Ĉiam estis granda plezuro ne nur aŭskulti sed ankaŭ spekti ĝin: la sep-homa kvar-voĉa grupo kantas sen instrumentoj, ege profesie, kaj montras belan varman vigecon, movecon kaj gajecon sur la scenejo.

La disko entenas 25 kantojn pri Kristnasko, bonega temo, kutime religia, sed ne nur: ĉu oni ne povas konsideri tiun naskiĝon kiel simbolon de ĉiutaga miraklo sur la tuta planedo, kiam bebo aperas?

La kantoj estas plej ofte religiaj kaj klasikaj, multaj nederlandaj, aliaj eŭropaj. Kelkaj inter ili estas internacie konataj, iom tro, kiel *Jus naskiĝis infan' de Di' (Il est né le divin enfant)*, kies melodion oni tiom aŭdas (aŭdaĉas) ĉie, ĉiam dum la jarfino, precipe en la vendejoj por allogi klientojn, ke ĝi aspektas nun sona poluado.

Tiun elekton de repertuaro mi iom bedaŭras, ĉar ekzistas tra la mondo multege da popolaj kristnaskaj kantoj, belegaj,

ekzotikaj kaj plej diversstilaj, ekzemple en Sudameriko, sed ankaŭ en francaj provincoj oni trovas tiajn juvelajn kantojn. Komprenable tiu elekto postulus enketojn, serĉojn, laboron pro tradukado kaj harmonizado; ni ja scias, ke tio ne estas facilaj taskoj, ĉar tion ni provis fari por nia lasta KD *Plu Meven* pri la temo *maristaj kantoj de la mondo*; ni parte sukcesis, sed ne tiom kiom ni esperis. Do ni povas pensi ke Akordo ne celis tion, jam havis la repertuaron preta en la valizo, kaj deziris nur ekspluati ĝin. Jam tiel estis sendube por ilia unua disko, kies temo estas *Renesanco*. Jen ni alvokas ilin: ili sin turnu al la mondo kaj proponu al Esperantio multe pli buntecan muzikon; tiam ili kontribuos al konstruado de vere internacia kulturo kaj ili ricevos aplaŭdojn, ĉar certe la grupo havas nekredoblan kvazaŭprofesiecon, belegajn voĉojn kaj ĝi meritas famon. La tradukoj estas bonegaj, ankaŭ la interpretado kaj harmonizado.

Do, se vi ŝatas religian etoson, ne hezitu kaj akiru la diskon, ankaŭ se vi ŝatas klasikan muzikon, ankaŭ se vi deziras simple ĝui aŭskultadon de bela korusa kantado. Ĉiukaze ĝi estas bonega ideo por donaco dum tiu ĉi jarfina periodo.

Franjo Provost



La vojo al Tibeto

La Taglibro de Csoma Sándor. Lajos Magyar. El la hungara trad. Jozefo E. Nagy. Rotterdam: Bero, 2004. 33p. 21cm. € 6,00

En mia adolesko hungara (jam tute malsama ol la *Adolesko* de Vaha), super mia lito pendis, ekzemplodone, bildo de Sándor Kőrösi Csoma, sufiĉe simila al la kovrilo de ĉi tiu broŝuro. Csoma rolis en mia persona panteono – ideale do ne mi, iom adepta, devus recenzi ĉi tiun longan poemon.

Leganto malpli Csoma-nia informu sin unue per la dorsa biografieto, kaj, post legado de *La taglibro*, prefere eĉ per la

daŭre havebla *La vivo de Sándor Kőrösi Csoma* (1984) de Ferenc Szilágyi (alia Szilágyi, ne la "nia"). El ambaŭ klare videblas la escepta voĵiro de ĉi tiu obstina sikulo*, celinta trovi la originon de hungaroj sed trovinta, kiel Kolumbo Amerikon – tibetologion. (La fekundecon de tiaj mistrovaj prilumis Umberto Eco en sia *La serĉado de la perfekta lingvo*.)





Sándor Kőrösi Csoma

Ensalti sen antaŭkonoj en la dek tri strofarojn de Magyari forprenos tamen neniom el via poezia ĝuo, “nur” el tiu intelekta. Ĉar Jozefo E. Nagy, ofta kaj grandkapabla tradukanto ambaŭdirekta inter la hungara kaj Esperanto, liveras tekston kiu en si mem brilas. Minoran kritikon al ĝi oni rajtus formuli nur post zorga komparo kun la spegule aperanta hungara teksto, kaj prefere nur farinte propran tradukon. (Ĉiuokaze, sur p. 25 mi “torturus” anstataŭ “turmenti”.) Ni legas altan, noblan tekston el 1970, netuŝeblan

Reĝino... ne sen makuloj

Reĝino Jokasta. Triakta dramo. Constantin Zărnescu. El la rumana trad. Ionel Onet. **Chapécó:** Fonto, 2004. 200p. 22cm. Prezo: € 16,50

Antaŭ jarcento Sigmund Freud elfosis la rakonton de Edipo el la antikva greka mitologio, por nomi la faman psikologian komplekson, kiun li priskribis. Constantin Zărnescu klopodas nun malkovri la tragikan pozicion de la virino en tiu mito per sia teatraĵo *Reĝino Jokasta*.

Kvankam la dramaturgo bazis sian teatraĵon sur la antikva mito kaj tragedioj de Sofoklo, ĝi forme kaj strukture ne similas al la tradiciaj grekaj tragedioj. Kiel klarigite en la subtitolo, ĝi fakte estas moderna triakta dramo kiu, ekde la komenco, konigas al la spektanto la kernon de la mito, t.e. ke Edipo murdis sian patron kaj edziĝis kun sia patrino. Tiel Zărnescu deigas de la Sofoklaj tragediaj praktikoj por manifesti sian feministan vidpunkton kaj movi la fokuson el la “hubriso” (kontraŭdia ago) de Edipo al la psikologia batalo en Jokasta.

Paŝante en la gineceo de la Teba palaco, ĉirkaŭate de ina akompanantaro kaj subtenate de sia maljuna nutristino, Reĝino

de ajna relativigemo postmoderna. Ĉe nialingva leganto la versoj resonigos mensajn eĥojn eble de *La infana raso* kaj de Zamenhof-biografioj. Merite!

Parenteze, *La taglibro* vige vivas ĉe la publiko hungara, precipe transilvania: voĉlegata en lernejaj festoj, parkerata de poeto-kolegoj, ĝi cetere havas ankaŭ francan tradukon de Tivadar Goričovič kaj Marc Delouze.

Kaj Csoma plu montras la vojon: la vojaĝo de esperantisto Ōdon Jakabos, el Transilvanio al Tibeto (1972-73) fariĝis omaĝa pilgrimado preze de sia propra vivo.

István Ertl

*sikulo = hungaro el sud-orianta Transilvanio



Jokasta esploras la multoblajn sociajn rolojn de la virinoj kaj la konflikton inter sia persona feliĉo kaj la bonfarto de la socio. Eĥante la antikvajn religiojn kiuj adoris la “sanktan inon”, Jokasta priskribas la virinojn per mistikaj terminoj kiel “naskantojn” kaj “protektantojn de vivo”. Kiel tiu de vera virino, ŝiaj sentoj ŝanĝiĝas laŭhumore, etendigante de logikemo ĝis plena malespero aŭ eĉ nekontrollebla histerio. Je la fino de la teatraĵo Jokasta prezentas sin kiel mesian inan figuron kiu serĉas “alian reĝlandon... ĉielan”. Tuj poste ŝi krias “ĉio estas en ordo” kaj ŝi mortigas sin, klopodante ŝanĝi la pozicion de la virinoj kaj samtempe savi la vivon de sia edzo-filo kaj la sorton de Tebo.

Dum la tuta teatraĵo, la nutristino atestas la tragedion de Jokasta (fakte, ŝi atestis la tutan vivon de la reĝino, la naskiĝon de ŝia edzo-filo kaj ilia rekuniĝo), komentas pri ĝi kaj, efektive, ŝi reprezentas la voĉon kaj la sentojn de la spektantoj. La roloj de la ceteraj karakteroj kiuj aperas sur la scenejo (Edipo, Kreono, Tirezio ktp) estas pli-malpli similaj al tiuj de la sofokla tragedio *Reĝo Edipo*. Tamen, ĉi-kadre, ili fefe agas kiel subtena materialo por la psikologia dramo de Jokasta.

Generale, *Reĝino Jokasta* rakontas jam delonge konatan miton el neatendita vidpunkto. Tial ĝi sendube estas ege interesa teatraĵo, sed ĝi kelkfoje ankaŭ iĝas tede. Eble tio estas pro ĝia longa kaj malrapida evoluo (ĝi ŝajne estas preskaŭ kvaroble pli longa ol la sofokla *Reĝo Edipo*) aŭ pro la ripetemo de kelkaj karakteroj (precipe Jokasta).

Tamen, la plej grava problemo de tiu ĉi eldono de *Reĝino Jokasta* estas ke al ĝi mankas informa enkonduko al la tragedio de Edipo-Jokasta. La tripaĝa enkonduko, kiun verkis la dramaturgo mem, eksplikas nur kial kaj kiel li verkis la teatraĵon. Ĝi ne donas la necesan mitologian fonon, kiu helpus la leganton/spektanton kompreni tion, kio okazas en la teatraĵo. Ŝajne la eldonanto kredis ke la mito estas internacie konata, sed tiaj supozoj ne povas esti validaj en diversoriginaj internaciaj komunumoj kiel la esperantistaro. Plie, *Reĝino Jokasta* plenas je grekaj nomoj: Moĵra, Pajno, Dorido, Labdakidoj ktp. Bedaŭrinde, ili nenie estas klarigitaj. Tio sendube ne ĝenos grekajn aŭ filologajn esperantistojn, sed aliaj, nespertuloj sendube devos sin turni al siaj nacilingvaj enciklopedioj por kompreni kelkajn aludojn.

Konklude, *Reĝino Jokasta* estas leginda teatraĵo. Tamen, oni devas unue koni la legendon mem kaj poste ĝui ĉion kion la dramaturgo proponas per sia kreaĵo.

Efthimios Mavrogeorgiadis

Laste Aperis

LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio aldoniĝas 6%, al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% pro la aldonvalora imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimume 2,25 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe <http://www.uea.org/katalogo/>.

Angla-Esperanta-hungara etvortaro pri homa vivo kaj loĝado. Ilona Koutny. Poznań: Prodruk, 2005. 156p. ISBN 8389887193. 17cm. Ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj. € 9,90

Angla-Esperanta-litova etvortaro pri lernado kaj laboro. Ilona Koutny, Aida Čizikaitė. Poznań / Kaunas: Prodruk / Lietuvos esperantininkų sąjunga, 2005. 143p. ISBN 8389887207. 18cm. Ĉ. 1200 vortoj kaj esprimoj. € 9,90

Antaŭen. Jānis Rainis. Ilustris Alise Mediņa. El la latva trad. div. Rīgo: Radieto, 2005. 35p. 15cm. Poemoj de rimarkinda latva literaturisto. € 3,90

Bildlibro sen bildoj. H.C. Andersen. Ilustratoj de Odense Bys Museer. El la dana trad. B. Trærup. Gilleleje: Trærup, 2005. 56p. ISBN 8790537068. 21cm. 33 “vesperoj” inspiritaj de veraj aŭ imagitaj vojaĝoj. € 10,80

Czy święci mówią w esperanto? Katarzyna Tempczyk. Malbork, 2005. 124p. 21cm. Pollingva. Pri la rilatoj inter eklezio kaj Esperanto. € 6,00

Dua decenio. Druhé desaťročie. Ján Vajs. Liptova E-klubo, 2002. 50p. ISBN 8096890808. 23cm. Kun nigre-blankaj fotoj. Retrorigardo al la Vintraj supreniroj de esperantistoj al la montpinto Poludnica (SK). € 3,00

Enciklopedio de historio de la E-movado en USSR. Dmitrij M. Cibulevskij. Ĥarkiv: dmic, 2002. 165p. 21cm. Ilus. Preskaŭ 550 enskriboj de nomoj, eventoj kaj eldonaĵoj. € 6,00

Esperantaj vojetoj renkontiĝas en Romo / Esperantiekie ścieżki spotykają w Rzymie. Impresje / Impresje. Krystyna Macińska. Romo: Fondajo Johano Paŭlo II, 2001. 120p. 24cm. Ilus. Du-lingva (E, pola). Impresoj de la aŭtorino kolektitaj okaze de ŝiaj vojaĝoj lige kun la papo, plus kelkaj leteroj samtemaj. € 10,50

Esperanto dĵa mejndunarodnoĝ obŝĉenija. Uĉebnoe posobie. I.G. Gončarova. Moskva: Info-Rutenija, 2004. 130p. 21cm. Kurso en 13 lecionoj, celanta unuavice hejmajn studentojn de Esperanto. € 6,00

Esperanto dum 7 tagoj. Lernolibro por juraj kaj ekonomikaj fakultatoj kaj superlernejoj. L.L. Tuhvatullina, G.M. Silo. Moskva: EUJ Justo, 2004. 64 + 4p. 21cm. € 3,00

Fabelo pri nobla cervo. Skazka o blagorodnom olenie. B. Prokazov. Trad. el la rusa. Minsk: MET, 1996. 14p. ISBN 9856021812. 14cm. Du-lingva (E, rusa). Plenkolora ilustrita fabelo por infanoj. € 0,90

Fabeletoj. Elvira Lippe. Ilustris Alise Mediņa. Rīga, 1999. 19p. 15cm. Unupaĝaj originalaj poemoj. € 0,90

Familia etoso. Agnès Jaoui kaj Jean-Pierre Bacri. El la franca trad. R. Cash. Teatro Trupo de Tuluzo, 2004. 68p. 21cm. Realisma kaj humura priskribo de funkciado de rutina familia sistemo. € 8,10

Kazki ta legendi. Vasilij Eroŝenko. En la ukrainan trad. N. Andrianova-

Gordienko. Kijiv: Vidavec Karpenko B.M., 2004. 97p. ISBN 9667833968. 20cm. 15 fabeloj kaj legendoj. € 6,00

Liste der Volapük-Verbände und Vereine. Johan Schmidt. Antaŭparolo de R. Hauptenthal. Saarbrücken: Iltis, 2005. 20p. ISBN 3932807359. 30cm. Listo de volapük-organizaĵoj, kompilita laŭ listoj kaj manuskriptoj postlasitaj de J.M. Schleyer. € 3,60

Ombro de meditoj. Aforismoj kaj miniaturoj. Leonas Buŝma. El la litova trad. Ĉ.L. Tručiūnis kaj T. Lukoševičius. Vilnius: Vaga, 1981. 111p. ISBN 9955412917. 21cm. Aforismoj kaj mallongaj, pensigaj prozaĵoj. € 4,20

Pfeilgebete zu Gott dem Heiligen Geiste. Johann Martin Schleyer. Postparolo de R. Hauptenthal. Saarbrücken: Iltis, 2005. 16p. ISBN 3932807383. 21cm. Germanlingva. Represo de preĝo, kies unua eldono aperis en 1911. € 2,70

Po dikoj Kamĉatke. Sten Bergman. El Esperanto trad. A. Natinja. Petropavlovsk-Kamĉatkij: Knijnoe izdatel'stvo, 2000. 164p. ISBN 5858570968. 20cm. Ilus. Ruslingva versio de *Tra sovaĝa Kamĉatko*. € 5,40

Problem einer künstlichen Weltverkehrssprache, Das. Siegfried Lederer. Postparolo de R. Hauptenthal. Saarbrücken: Iltis, 2005. 12p. ISBN 3932807464. 21cm. Germanlingva. Represo de parolado el 1899. € 2,70

Sizifo sen ŝtono. Pensoj kaj aludoj. Vytautas Karalius. El la litova trad. P. Lukoševičienė k. T.

Lukoŝevičius. Vilnius: Panevėžio spaustuvė, 2005. 79p. ISBN 9955412909. 21cm. Kun desegnaĵoj de J. Varnas. € 3,90

Zamenhof/Esperanto-Objektoj (ZEO). Pola listo. Robert Kamiński. Łódź: PEA, Filio en Lodzo, 2005. 24p. 21cm. Kun ilustraĵoj. Du-lingva (E, pola). Listo de ZEOj en Pollando; stato je 050315. € 4,50

NELIBROJ

Ĉi tie loĝas Miĉjo. Mihail Povorin. Moskva: la aŭtoro, [2005]. 79 min. 24 folkecaj pecoj, kun akompana gitaro. KD. € 4,50

Gerda malaperis! Claude Piron. Legis: Yassumura, Cid, Schumacher Cid, Aristeu, Mikami k.a. Leuven: Esperanto 3000, 2005. Du diskoj. Voĉlegita versio de la populara instruomaneto. KD. € 8,40

Glumarko Florenco. 91-a UK de Esperanto 2006. Rotterdam: UEA, 2005. Folio (12x20cm) kun 12 glumarkoj. € 1,20. Triona rabato ekde 3 folioj.

ICH – Interkultura Centro Herzberg. Herzberg/Harz: ICH, [2005]. Parte germanlingva. Komputila KD pri la Interkultura Centro Herzberg (Germanio). € 7,50

Lerneja amikoj. Asorti. Visaginas: Asorti, 2005. 54 min. 18 pecoj, parte originalaj, parte tradukitaj el la rusa aŭ la litova. KD. € 9,90

Litova kanto en Esperanto. Ensemblo “Estradinės melodijos”. I. Gudonytė, V. Šilas, V. Banaitis. 2005. 41 min. 12 leĝermuzikaj pecoj. KD. € 4,50

Ukrainaj kantoj en Esperanto. Societo “Espero”. Kun tekstobroŝuro. 20 ukrainaj popolkantoj, precipe el la okcidento de la lando. 48 min. KD. € 15,00

La angulo de



Esperantilingva Verkista Asocio
<http://www.everk.org/>

John Francis: El «La fino»

La nebulozoj drivas unu de la alia al limo de la kosmo disige kaj konstante. Pro vasto de l' procezo, senmova iluzia ankoraŭ regas ĉie, eternon mensogante.



Sed jam la astroj raras: kie antaŭe mikse kunsvarmis la mortantaj kun la embriaj steloj, jen nur mortantaj restas: nenie plu fenikse ekflamas posteuloj de l' forbrulintaj ŝeloj.

La astroj daŭre dronas en la mallum' avida ĝis cindre dispeciĝas la lasta steltaĉmento; kaj, ĉie konsumita de paraliz' insida, senvive sin etendas vakua firmamento.

John Francis (1924-) partoprenis en la mejloŝtona kolekto «Kvaropo» (1952) per grandioza kosma ciklo (el kiu ni ĉerpis la finalon), kaj poste abunde verkis poezie kaj proze. Interalie: «Vitalo» (1960), «La granda kaldrono» (1978), «Tri rakontoj pri la Miljara Paco» (1998), «La kastelo de vitro» (2004).



❖ **KATALUNIO:** De la 2-a ĝis la 4-a de septembro, okaze de la urbofesto de Sabadell, okazis la t.n. barakoj, kie ĉiunokte okazadis koncertoj. 25 barakojn prizorgis 25 asocioj, inter ili Kataluna Esperanto-junularo. Kvankam oni disdonis flugfoliojn kaj vendis stelpinglojn kaj iom da Esperanto-muziko, la ĉefa celo de la budo estis, ke esperantistoj aperu tutnormale apud multaj aliaj asocioj en junulara medio.

Hektor Alos i Font

❖ **UZBEKIO/JAPANIO:** En aŭgusto 2005 du samarkandaj esperantistoj, Anatoli Ionesov kaj Holikberdi Kozimov (Internacia Muzeo de Paco kaj Solidaro), akompane de du japanaj pacamikoj Ohba Mitsuru kaj Nakayama Naohisa, sukcese atingis la montpinton de Fuji. Tie ili flirtigis E-flagetojn kaj la naciajn flagojn de Japanio kaj Uzbekio. La montgrimpado de 4-persona uzbekaj-japana teamo komenciĝis noktomeze la 16-an de aŭgusto kaj frumatene la 17-an de aŭgusto la kvaropo jam estis sur la montopinto de Fuji (3776 m). 'Regu Paco sur la Tero' - tiu ĉi alvoko eksonis ankaŭ esperantlingve de sur la plej alta japana monto...

Anatoli Ionesov



Sur la montopinto de Fuji

❖ **POLLANDO:** Okaze de la Internacia Tago de Turismo, la 27-an de septembro, la gestudentoj kaj profesoro de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo en Bydgoszcz (Pollando) estis akceptitaj de la urbestro de tiu granda pola urbo. La urbestro Konstanty Dombrowicz promesis helpi por realigi la peton doni la nomon 'Bulvardo Esperanto', situanta en bela apudrivera loko, en la centro de la urbo. Partoprenis krom la urbaj aŭtoritatuloj studentoj kaj profesoroj el Pollando, Ĉinio, Hispanio, Japanio, Belgio,

Aŭstralio, Bulgario, Senegalio, Kenjo, Mongolio, Germanio, Tanzanio, Zimbabvo, Tunizio kaj Kongo. La urbestro mem tre ofte kunlaboras kun la loka esperantistaro. La akcepto finiĝis per libera riĉa bufedo kaj ĉiu partoprenanto ricevis belan rememoraĵon de la urbodomio.

(Augusto Casquero)

❖ **KOLOMBIO:** Guido Ricci el Belgio salutis nian redakcion el Bogoto, kie li partoprenis en la 1-a nacia kongreso de Esperanto. Li vizitis la ĉefurbon de la departemento Magdalena, Santa Marta, kaj renkontis tie la solan Esperanto-parolanton de la urbo: Diomar Chavez Obregón. Tiu lernis Esperanton pasintjare per interreto, neniam renkontis alian esperantiston kaj nun gvidas kurson por komencantoj en la universitato de Magdalena.



Guido Ricci kaj la kursanoj en S. Marta

❖ **BRAZILIO:** La sepa Ago-Tago de EKOR, Esperanta Kunfratiĝo de Okcidenta Regiono, okazis la 30-an de oktobro en Rio-de-Janeiro, la kvartalo Campo Grande. Sur la ĉefstrato trideko da esperantistoj vikle propagandis nian idealon per organizo de bela stando kun pluraj esperantistaj objektoj kaj



La sepa Ago-Tago de EKOR en Rio-de-Janeiro



disdonado de pli ol 1000 faldfolioj pri Esperanto.

(Celso Pinheiro)

❖ **JAPANIO:** La 22-an de oktobro, kadre de la 92-a Japana Esperanto-Kongreso, okazis la 5-a publika simpozio de Japana Esperanto-Instituto, titolita *Kiel japanoj rilatis kun internacia lingvo? Lukto kun okcidenta civilizacio el lingva vidpunkto*. Yositate Masaki, fakulo pri interlingva komunikado, proponis strategion por allogi al multlingvismo, anstataŭ akuzi anglalingvan imperismon. La interlingvisto Usui Hiroyuki klarigis la "sendolorigilan" kaj identecstabiligan funkcion de Esperanto kiel alternativa internacia lingvo. Kunihiro Masao, eksa senatano kaj konata majstra uzanto de la angla lingvo, prezentis ekzemplojn de eminentaj japanoj, kiuj sukcese proprigis al si tiun lingvon por agadi internacie. Sed, agnoskante la ekzistantan maljustecon en internacia lingva komunikado, fine de la diskutado li surprizis la aŭskultantojn, promesante mem eklerni Esperanton. La simpozion prezidis Kimura Goro Christoph kaj ĉeestis ĉ. 400 homoj.

Syōzi Keiko

Oficiala informilo

DUMVIVAJ MEMBROJ

